# Enhavo


- **anoncoj**
  Forpasis Allan C. Boschen; Is your group info up to date?; Nova versio de la retejo *Tekstaro*; New products in the E-USA store; Alvoko al artistoj por la 103-a UK; Konfesi sekretojn… poŝtkarte; Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK) 2018; Invito prelegi en la IKU-sesio en Lisbono; *Zoom* available for local Esperanto groups; Specials in the E-USA store; Korespondi deziras; Subten-eblo por partopreni en UK; Correction
- **Du anoncoj kaj dek defioj**
  de la prezidanto - Filipo Dorcas
  Du anoncoj, kaj dek defioj, kiuj nun alfrontas nin.
- **de la estraro**
  Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.
- **La suneklipso de 2017**
  scienco - Walter Murawski
  Spertoj de Walter MURAWSKI en Suda Karolino.
- **Fred MEYER, nia unua laŭdato**
  laŭdoj - Charlotte Burton
  Unua artikolo en nova rubriko, en kiu ni prezentas agadojn de niaj membroj.
- **loke**
  Malgraŭ uragano Harvey; Tri-kantona Paralela Universo
- **La rostfesta murdo**
  enigmo-solvoj
  Solvo de nia pasintnumera enigmo.
- **Fiamo**
  senintenca esperantaĵo?
  Ĉu maldeca amo al picoj, aŭ ĉu amo al maldecaj picoj? Aŭ ĉu ambaŭ?!





Parta suneklipso fotita en Roĉestro, Novjorkio.

# Usona Esperantisto

**Redaktoro / Editor:** Hoss Firooznia

Sendu kontribuaĵojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [http://esperanto-usa.org]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

*Usona Esperantisto* estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia TTT-paĝaro.

❧

*Usona Esperantisto* ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [http://esperanto-usa.org]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style manual on our website.

## Forpasis Allan C. Boschen



Nia kara amiko kaj pacbatalanto Allan Boschen naskiĝis la 10-an de Septembro, 1924, kaj forpasis en sia hejmo en Masaĉuseco la 7-an de Septembro, 2017.

Dum la dua mondmilito li servis kiel elektristo kaj estro en usona armea bazo en Hindujo. Post lia bakalaŭra studo de elektra inĝenierarto ĉe Newark College of Engineering en 1953, li laboris kiel inĝeniero en Tajvano en la 1950-aj jaroj. En 1961 li laboris por la firmao General Electric en Pittsfield, Masaĉuseco, kaj poste en programado por la usona mararmeo.

Li magistriĝis pri edukado ĉe North Adams State College en 1972, kaj tiam komencis instrui en mezlernejo Hoosac Valley High School. En 1979 li reiris al General Electric kie li laboris ĝis emeritiĝo.

Allan havis verdan koron por la tuta mondo kaj estis forta batalanto por monda paco. Ni bone konis lin kiel aktivulon por Esperanto kaj internacia amikeco. Li vojaĝis multe al Esperantaj kongresoj kaj kunvenoj en multaj landoj.

Inter liaj verkoj troviĝas *Introducing Reading at Two*, *Education Reform in the Substance of Learning*, *How I Got Involved in Esperanto*, kaj *Esperanto, To Aid Education Reform*.


Lia deziro estis ke ni memorige donacu monon al Esperanto-USA.

Jen kelkaj ligoj:

- Nekrologo en la angla [https://goo.gl/LAcPFZ]
- UMass Amherst: The Allan C. Boschen Esperanto Collection [https://goo.gl/Lcxwtu]
- Esperanto, To Aid Education Reform [https://goo.gl/8bvDEu]

— *Filipo Dorcas*

## Is your group info up to date?



Recently we've been updating the contact information for local groups on our website. But some of our information is still outdated, and we need your help. Please check the group listings for your state or territory [http://esperanto-usa.org/groups/] and make sure the data is current. We can include contact addresses, phone numbers, and links to your group's online resources (websites, Meetup pages, etc.). Send updates to <webmaster@esperanto-usa.org>.

Member Anna Bennett also reminds us of UEA's own web database of local groups [http://esperanto.net/eo/lokaj-organizoj/], where many U.S. groups are not represented at all. After you've updated your listing with us, please have a look at the UEA site as well.

## Nova versio de la retejo *Tekstaro*

La retejo *Tekstaro* [http://tekstaro.com] estas granda kolekto de modelaj Esperantaj tekstoj, en kiuj oni povas serĉi diversajn vortojn, esprimojn, gramatikajn erojn por kontroli realan uzadon en Esperanto, kaj por fari diversajn analizojn pri la reala lingvo-uzado.

Lastatempe aperis nova versio kiu provizas al uzantoj plurajn plibonigojn. Al la korpuso de skriba Esperanto aldoniĝis gravaj pliaj verkoj de Zamenhof el pluraj periodoj. Modernigo de la interfaco nun permesas la samtempan serĉadon laŭ pluraj serĉesprimoj, kaj donas novajn eblojn por eltrovi, kompari, kaj kontrasti detalojn pri la uzado de Esperanto. Ĉio funkcias pli rapide, kaj la manieroj konstrui serĉesprimojn estas pli klaraj.


La Tekstaro estas la plej granda alirebla korpuso de skribita Esperanto; ĝi estas ankaŭ inter la plej gravaj projektoj, kiujn ESF komisiis. En la jaro 2002, la fama sveda gramatikisto Bertilo Wennergren komencis realigi la projekton. Bertilo estas la aŭtoro

de *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* [http://bertilow.com/pmeg] (PMEG), grava libro pri Esperanta gramatiko kaj uzado. *La Ondo de Esperanto* nomis lin “Esperantisto de la Jaro 2006”, kaj UEA honoris lin pro lia estara agado.

Inter la planoj por plia evoluo de Tekstaro estas morfologia markado de la korpuso: t.e., aldono de “signetoj” al la jam ekzistantaj tekstoj, tiel ke en serĉado oni povu eviti la konfuzon inter, ekzemple, la vortoj *per/son/e – person/e*, *per/fid/e – perfid/e*, ktp. La tekstaroj de naciaj lingvoj kutime havas tiajn indikilojn, kaj aldoni ilin levos la kapablojn kaj la utilon de Tekstaro al eĉ pli granda nivelo.

## New products in the E-USA store

- **DEMONO KUN ATOMA CERBO**
  Christopher Mihm
  Another homage to the 1950’s sci-fi horror films by Christopher Mihm. Be prepared for women to be treated in a politically incorrect (but historically correct) way by military personnel. DVD. 76 mins. 2017. USA. Catalog#: DEM002. $10.00. Link [http://bit.ly/2A3Jerd]




- **Sticker: Esperanto flag**
  Esperanto Flag Sticker. 4×3″. USA. Catalog#: GLU007. $2.00. Link [http://bit.ly/2xCSdAq]

- **Sticker: *Proksimiĝo de kulturoj***
  Another sticker to advertise Esperanto. 4×3″. USA. Catalog#: GLU009. $2.00. Link [http://bit.ly/2xCV78j]

- **Sticker: *Esperanto, la lingvo internacia***
  4×3″ sticker you can put anywhere to advertise Esperanto. Catalog#: GLU008. $2.00. Link [http://bit.ly/2xCwzfq]

- **Sticker: *FARU ESPERANTUJON GRANDA DENOVE***
  Amusing phrase from the Trump era. Sticker. 4×3″. Catalog#: GLU006. $2.00. Link [http://bit.ly/2xC7ZLB]

- **Sticker: *Sekreta societo de esperantistoj***
  If you are a member of the Secret Society of Esperantists, these stickers are for you. 4×3″. USA. Catalog#: GLU005. $2.00. Link [http://bit.ly/2xCVvDF]

- **Sticker: Esperanto ekde 1887**
  Another advertisement for Esperanto. Sticker. 4×3″. USA. Catalog#: GLU010. $2.00. Link [http://bit.ly/2xCPtTA]

Order from *Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530*, or online [http://esperanto-usa.org/store].

## Alvoko al artistoj por la 103-a UK

La organizantoj de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono alvokas artistojn por prezenti siajn verkojn. Kandidatiĝoj estu senditaj rete al <artkandidatoj@co.uea.org>, aŭ letere al la CO de UEA ĝis la 30-a de Novembro.

La decidantoj aparte bonvenigas proponojn kiuj rilatas al la Jaro de la Esperanta Kulturo kaj favoros programerojn, kiuj montras niajn tutmondecon kaj diversecon.

Kandidatiĝoj enhavu la jenan informon: kontaktinformo (laŭeble telefonnumero, retadreso, artista kaj oficiala nomoj), speco de artaĵo (koncerto, teatro, danco ktp); daŭro; bezonataj teknikaĵoj; mallonga teksto kun informoj pri la artisto(j)/trupo kaj resumo de la prezento (inkluzive de eventualaj specifaj petoj – teknikaj aŭ alispecaj — rilataj al la prezentaĵo); specimeno de la prezento (mp3, DVD, ligilo al retejo ktp); eventuala financa subteno bezonata (honorario kaj elspezrepago).

## Konfesi sekretojn… poŝtkarte

Lastatempe anonciĝis grupa artprojekto *Publikigu*

*sekreton*, Esperanta versio de la anglalingva *Postsecret*. Oni anonime sendu al la suba adreso sekreton skribitan sur poŝtkarto, kaj venontjare la kartoj aperos en artprojekto.




Sekreto povas temi pri bedaŭro, timo, perfido, deziro, konfeso, aŭ infanaĝa humiliĝo, ekzemple. Sed ĝi nepre estu afero vera, kiun oni neniam antaŭe komunikis. Oni prefere skribu klare kaj ne uzu multajn vortojn. Anstataŭ (aŭ aldone al) vortoj, ankaŭ desegnaĵoj estas bonvenaj.

PUBLIKIGU SEKRETON
Rm2, 4F, No1.
Gongde 1st St. PingTung City,
PingTung County 90067.
Taiwan

## Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK) 2018



Venontprintempe okazos TKEK en Sakramento, Kalifornio, denove ĉe la Internacia Junulargastejo samkiel en printempo 2013. Datoj, prezoj kaj aliaj detaloj haveblas ĉe la TKEK-retejo [http://esperanto.org/tkek].

La aranĝo estos simila al tiu en 2013, kiam okazis tre sukcesa renkontiĝo kun granda grupo kaj amuzaj programeroj: Skrablo kaj aliaj grupludoj, promenado kaj manĝado en la urbocentro, komune kuirita bankedo ktp. La renkontiĝo estos denove neformala, babiliga, amika okazo praktiki Esperanton dum tuta semajnfino. Kvankam nomata "Kalifornia" konferenco, kompreneble esperantistoj de ie ajn estas bonvenaj.

La ejo estas bela viktoriepoka domego, tre elegante ornamita kun hejmeca etoso kaj multe da lokoj ripozi komforte kaj babili. Estas ĉefe grupĉambroj kun etaĝlitoj por malalta kosto, sed haveblas ankaŭ kelkaj privataj ĉambroj por unuopuloj, paroj aŭ familioj. Komuna kuirejo eĉ ebligos kunan preparadon de manĝaĵoj se oni volas (bona okazo lerni novajn vortojn por ĉiutagaj manĝiloj kaj manĝaĵoj!)

Venu ĝui semajnfinon da amuziĝo kaj amikiĝo centre de la ĉefurbo de Kalifornio!

## Invito prelegi en la IKU-sesio en Lisbono

Kadre de la 103-a UK en Lisbono okazos la 71-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete (<amri@huji.ac.il>) au poŝte: (prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo). La proponoj alvenu plej laste la 31-an de Januaro 2018.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu prelego kadre de IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝo. Proponoj kiuj ne estos elektitaj por IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj, kiel Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de €260. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de teksto por la IKU-libro kaj duono de la efektiva okazigo de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU [http://uea.org/dokumentoj/IKU/].

## *Zoom* available for local Esperanto groups

Esperanto-USA and Esperantic Studies Foundation are jointly offering use of the


teleconferencing service Zoom to local Esperanto groups, free of charge.

Zoom is a paid service that is often more stable and offers better audio quality than free services like Skype and Google Hangouts. The purpose for offering this service is to encourage and facilitate building local and online Esperanto communities.

Groups can request a one-time use of Zoom; however, we encourage groups to have regular call times. To request use of Zoom, send email to <chuck.mays@esperantic.org> with the dates and times for your online meetings, a brief description of the meeting and who to contact about the meeting.

If the requested time does not conflict with an already scheduled meeting, the meeting will be scheduled and you will be sent a link to distribute to others. Unfortunately, only one Zoom meeting at a time is allowed, so coordination is required. Participants in this program are encouraged to publicize the online meeting, to invite guest speakers and to use Zoom to help new learners, etc. Regular meetings can be listed on the Esperanto-USA website in the section for local groups.

## Specials in the E-USA store




- **MANOJ DE EŬRIDICA, LA**
  Pedro Bloch
  Trans. Geraldo Mattos. A virtuoso theater-piece: a one-man show which covers an amazing breadth of material in a wide range of emotional states. 1997. 63p. Paperback. Brazil. Catalog#: MAN003. $4.00. Link [http://bit.ly/2y2JYdG]

- **AL LA TERO RETURNE**
  Gilbert R. Ledon
  A critical view of several aspects of human societies and activities. Interesting and useful information about the present-day poor health of the Earth. 1992. 159p. Paper. Brazil. Catalog#: ALL001. $3.00. Link [http://bit.ly/2y32EtU]

- **MORTO KAJ LA MORTO DE KINKAS AKVOBLEKO, LA**
  Jorge Amado
  Trans. Geraldo Pádua. A section from a masterpiece of Brazilian literature. 1984. 111p. Paperback. Brazil. Catalog#: MOR006. $4.00. Link [http://bit.ly/2y2qQg6]

- **SUR LA SOJLO DE LA AMO**
  Markéta Procházková
  Trans Jirí Korínek. Poetry from a young Czech poet, with a deeply penetrating view. 1986. 96p. Paperback. Brazil. Catalog#: SUR005. $3.00. Link [http://bit.ly/2y2P6i1]

- **VULPO KAJ LA VINBEROJ, LA**
  Guilherme Figueiredo
  Trans. Benedicto Silva. A famous and funny play whose characters are ancient Greeks: a philosopher, his wife, an army captain and several slaves. They wrestle with the importance and the dangers of personal freedom. 1997. 90p. Paperback. Brazil. Catalog#: VUL003. $6.00. Link [http://bit.ly/2y32QsV]

- **ĈIELARKA ESTONTO**
  Carmel Mallia
  A novel of love set in wartime Malta, by the well-known Maltese Esperantist author, poet and translator. 2002. 112p. Paperback. USA. Catalog#: CXIE02. $8.00. Link [http://bit.ly/2y32F0W]

- **PROMETEO LIGITA**
  Esĥilo
  Albert Goodheir's translation of the famous Greek play by Aeschylus. 1982. 54p. Paperback. Scotland. Catalog#: PRO006. $3.00. Link [http://bit.ly/2y30Fpn]

- **SONETOJ**
  Marie Under
  Trans. Hilda Dresen. New edition of a sonnet collection by an important Estonian poet. 1988.

62p. Paperback. Brazil. Catalog#: SON006. $2.00. Link [http://bit.ly/2wUiJSb]

- **SONETOJ DE L' NOKTO/SONETOS DA NOITE**
  Cruz E. Sousa
  Trans. Leopoldo H. Knoedt. This elegant little book includes seven profound sonnets in the original Portuguese with the Esperanto translations, as well as seven woodcut illustrations (by Hugo Mund Júnior). 1993. 56p. Paperback. Brazil. Catalog#: SON007. $2.00. Link [http://bit.ly/2wUJsxV]

- **KANAANO**
  Graça Aranha
  Trans. Caetano Coutinho. This historical novel from Brazil follows the lives of two German immigrants last century, each with conflicting ideologies on race supremacy. Social and psychological novel which opened a new era in Brazilian national literature. Illustrations by Percy Lau. 1987. 188p. Paperback. Brazil. Catalog#: KAN007. $5.50. Link [http://bit.ly/2wUYJ1v]

- **NEKONATA DIO, LA**
  Ferenc Mózsi
  Trans. István Nagy. Short story about the human tragedy behind a group of clay statues found in the ruins of a village. 1988. 44p. Paperback. Brazil. Catalog#: NEK003. $2.00. Link [http://bit.ly/2wUOASD]

- **MIA PADO**
  Gerrit Berveling
  A collection of twenty-five years' worth of essays, reviews, poems, and interviews from this famous and important author and translator. Follow the author's path of his life's work and share the depths of his spiritual thought. 1997. 311p. Paperback. Brazil. Catalog#: MIA003. $15.00. Link [http://bit.ly/2wVI13q]

- **ROBAIOJ, LA**
  Umar Kajjam
  Trans. Gaston Waringhien. Esperanto translation of the famous Rubáiyát of Omar Khayyám. Illustrations by Eugene Karlin. Third edition 1997. 151p. Paperback. Brazil. Catalog#: ROB003. $8.00. Link [http://bit.ly/2wUUm6M]

Order from *Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530*, or online [http://esperanto-usa.org/store].

## Subten-eblo por partopreni en UK

Danke al malavaraj donacintoj, UEA povas pagi aliĝkotizon de kelkaj kongresanoj dum la Universala Kongreso en Lisbono, en kelkaj kazoj ankaŭ manĝo- kaj loĝadkostojn en la plej malaltaj kategorioj, kaj en esceptaj kazoj vojaĝkostojn. Homoj el iu ajn lando, kiuj ne povas mem pagi la aliĝkotizon, rajtas kandidatiĝi.

Kondiĉoj:

- Oni estu individua membro de UEA/TEJO en 2017.
- Oni estu preta ricevi kaj realigi taskojn, kongresrilatajn, antaŭ, dum kaj post la UK.
- Oni plenigu formularon [http://tinyurl.com/formularo] ĝis la 30-a de Novembro.

En Seulo, subtenatoj ĉefe helpis pri fotado, filmado kaj en la Libroservo de UEA, sed la taskoj povas esti tre variaj. Ricevu subtenon kaj helpu la sukcesan okazigon de la plej granda Esperanta-renkontiĝo, kandidatiĝu nun!

## Korespondi deziras

Mi nomiĝas Ivan kaj mi ŝatus korespondi kun alilandaj esperantistoj. Mi estas 43-jaraĝa, italo, laboras en kultura instituto kaj studas historion, filozofion kaj lingvojn antikvajn kaj modernajn, inklude la planlingvojn.

**Ivan Orsini <ivarpas@yahoo.it>**

❧



Mi estas Eddy Machado HERNÁNDEZ, Delegito de la grupo de Kuba Esperanto-Asocio en la provinco Villa Clara en la centra regiono el Kubo. Ankaŭ instruanto de Esperanto.

Mi deziras vian kunlaboron por trovi por miaj gesamideanoj interkorespondantojn por amikeco, akiri alilandan kulturon kaj ankaŭ praktiki la lingvon.


**Eddy Machado HERNÁNDEZ, Apartado Postal 21, Colón № 10, 50100, Santa Clara, Villa Clara, Kubo. <emh469@gmail.com>**

❧

Mi estas Joel MUHIRE, Esperanto-instruisto kaj muzikisto el Demokratia Respubliko Kongo. Mi ege ŝatas korespondi kun usonanoj rete kaj poŝte. Ĉio pri mi troveblas en mia blogo [https://senopone.wordpress.com].

**Joel MUHIRE, Po Box 08 Ug, Bunagana-Kisoro, Ugando. <joelmuhire0@gmail.com>**

## Correction



In issue 2017:4 we published an announcement with the email address of tutor Diane Babek. The address we initially received was incorrect. Diane's correct email address is <dianababeck@gmx.de>.

# Du anoncoj kaj dek defioj

*Filipo DORCAS*

Via estraro [http://esperanto-usa.org/eusa/board/] laboras ofte, kaj bonvenigas viajn ideojn. Nepre donu viajn sugestojn al ili. Ilia kontaktinformo troviĝas en via ***Membrolisto de Esperanto-USA*** por 2017.

## Anonco 1

Ni dankas multe al la antaŭa prezidanto **Orlando RAOLA** kaj al la antaŭa estraro por doni al ni organizon, kiu kreskas. Malgraŭ defioj, ni daŭras kiel organizo kun granda espero kaj brila estonteco. Dankon, Orlando!

## Anonco 2

Ni donas **po $3000 jare dum kvin jaroj** por subteni la Esperantan katedron ĉe la **Universitato de Amsterdamo.** Pri tio, la kutima kritiko tutprave estas, "Kiel ni povas fari tion por iu en alia lando kun tiom da financaj defioj en nia propra organizo?" "Rigardu tiom da pliboniĝoj, kiujn ni povus aranĝi se ni elspezus tiun monon por ni mem en Esperanto-USA!" Sed, mi demandas al la kritikemuloj, "Kiuj ni estas?" kaj "Por kio ni ekzistas?" Ni en Esperanto-USA rolas en nur parto de la tuta Esperanta movado. Kiam ni komencos pensi nur pri fari ion por ni mem, tiam ni komencos perdi grandan parton de tio, kio ni estas. Kiam ni pensas nur pri ni mem, tiam nia komuna verda koro komencas rompiĝi. Ĉe la alia mano, kiam ni decidas agi por aliaj, por helpi al aliaj homoj kaj organizoj, tiam ni vidas pli fortajn rilatojn en la movado. Pro tio, ke tiu peto venis de ESF (*Esperantic Studies Foundation*) kaj pro tio ke la amsterdama katedro estas unika en la mondo, mi mem ĉe la estrara kunsido en Raleigh en 2017, kiel la venonta prezidanto, proponis la kvanton de $3000 jare. Tiam mi akceptis elteni kaj fronti la kritikojn tiurilate.


## Defio 1: Financaj mankoj

Ni perdas neimageblan kvanton da mono: **pli ol $30,000 jare**. Nia kasisto sugestis al mi, ke ni bezonas 2000 aŭ pli bone 2500 membrojn por esti stabila organizo. Ni nun havas 633 membrojn kaj kreskas po 17% jare. Tiu nuna kreskado ne sufiĉas por nia estonteco. Ni bezonos 1000 membrojn antaŭ la fino de 2017, kaj 2500 antaŭ la fino de 2018.

ELNA iam havis proksimume 1000 membrojn, sed **ni nun aktivas en nova Esperanta mondo**. Ni ne komparu tion, kion ni antaŭe faris kontraŭ tio, kion ni faros. Pro tio, ke kelkdek novaj esperantistoj en Usono diplomiĝas ĉe Duolingo **ĈIUN TAGON**, kaj pro la multaj novaj komunikiloj, ni havas grandan ŝancon akiri novajn membrojn.

## Defio 2: Kvanto da membroj

Ni ankoraŭ kreskas sed ne sufiĉe rapide. Nia membriĝa kampanjo devas fini kun granda sukceso. Tiu kampanjo estos kunlaboro inter la estraro, aliaj gvidantoj, la novaj regionaj helpantoj, la membriĝa komitato, kaj lokaj grupoj. Ni uzos tre diversajn komunikilojn por allogi lernantojn, kiuj studas en Duolingo kaj Lernu. Multaj el tiuj studantoj ne scias pri Esperanto-USA nek pri nia riĉa kulturo de amikeco en la **granda rondo familia**.



Lastatempa kresko en la membraro de Esperanto-USA.

## Defio 3: Lokaj grupoj

Lokaj grupoj kaptas nian atenton en la estraro pro ties graveco, kaj tio evidentiĝas en nia nova retejo.

Tie ni donos la liston de regionaj helpantoj. Tiuj regionaj helpantoj en nova servo al lokaj grupoj estos parto de nia pli forta komunika infrastrukturo. Lokaj grupoj ankaŭ rajtas peti helpon por uzi ilojn kiel Zoom kaj Meetup.

## Defio 4: Nia retejo

Ni jam sciis ke nia retejo estis en malbona, nesekura stato. La estraro jam planis novan retejon sed krizo okazis en la fruaj tagoj de Oktobro. Nia retejo tute paneis. Malgraŭ ĉiaj klopodoj, ni ne povis ĝin ripari nek restarigi. Nia nova retejestro, Hoss FIROOZNIA sin dediĉis multajn horojn por starigi novan retejon. Ni aldonas novajn paĝojn al ĝi paŝon post paŝo. Ni atendas viajn reagojn, sugestojn, kaj opiniojn pri ĝi.

## Defio 5: Pli vasta komunikado

Ni havas nian retejon kaj ĉefan organon, *Usona Esperantisto*, kaj ankaŭ nian paĝon en Facebook [https://facebook.com/esperantousa/]. Ni utiligas sociajn komunikilojn kiel Twitter [https://twitter.com/EsperantoUSA], informdonajn retkunvenojn (*"Webinars"*), kunvenojn de Zoom, Meetup, Reddit [https://reddit.com/r/EsperantoUSA/], Telegram, Snapchat, Instagram, kaj aliajn.

## Defio 6: Pli bona landa kongreso

Nia venonta kongreso en Seatlo [https://landakongreso.org] estos pli sukcesa pro via ĉeesto, pro la specialaj gastoj, pro novaj planoj por junuloj, kaj pro tendumado post la kongreso. Ni vidos vin en Seatlo de la 13-a ĝis la 16-a de Julio, 2018, tuj post NASK en Raleigh.

## Defio 7: Kvanto da estraranoj

Antaŭ kelkaj jaroj, la membraro de Esperanto-USA aprobis malgrandigi la kvanton de estraranoj de naŭ al ses (plus Pres., VP, Sekretario, kaj Kasisto). La ŝanĝo en la statuto tamen ne klarigis manieron fari tion. La venontan jaron ni elektis neniun, por tuj havi nur ses estraranojn. Ni nun estas en sistemo por elekti tri, kaj poste tri, kaj ĉiun trian jaron ni elektos neniun. Do, kiel ni transiru glate de la sistemo 3-3-0 al 2-2-2?

Ĉe la venonta Landa Kongreso en Seatlo, ni elektos du estraranojn por trijara deĵoro, kaj unu por unujara deĵoro. En 2019 ni elektos du estraranojn por la kutima trijara deĵoro. Unu estrarano tiam volonte ellasos la postenon post dujara deĵoro.

## Defio 8: Pli forta rilato kun ESF

Pro tio, ke ESF (*Esperantic Studies Foundation*) [http://esperantic.org/] jam faris kelkajn grandajn projektojn tre sukcese, kaj pro tio, ke **ESF celebros sian 50-an datrevenon en 2018**, Esperanto-USA strebas kunlabori kiel eble plej forte kaj efike kun ESF. La direktoro de ESF, Chuck MAYS, kunsidas kun mi interrete po kelkaj fojoj monate por kunlabori kaj elpensi kiel helpi unu la alian. Esperanto-USA respondis al la peto de ESF por subteni la Esperantan katedron ĉe la Universitato de Amsterdamo, kiun plenumas Profesoro Federico GOBBO. Ni ankaŭ kunlaboras por starigi helpon al niaj lokaj grupoj per informdonaj kunvenoj ("Webinars"), Zoom-kunvenoj, kaj Meetup.com. ESF proponas subteni nin per komunikiloj por lokaj grupoj. Ni multe dankas al ESF pro la helpo kaj kunlaboro.

## Defio 9: Restarigi kaj subteni al USEJ

La Usona Esperantista Junularo jam denove forte aktivas. Vidu ĝian paĝon en Facebook [https://facebook.com/groups/usejesperanto/]. Dankon al **Andreo Rosenbaum** kaj aliaj junuloj, kiuj restarigis nian organizon por junuloj en Usono. USEJ kaj la Loka Kongresa Komitato por nia landa kongreso jam havas planon por tendumado (*"camping trip"*) post la kongreso! Venu al la LK en Seatlo en 2018 kaj ĝuu la brilan Esperantan etoson kun junuloj!

## Defio 10: Edukado

La ĉefa organizo en Usono pri instruado de Esperanto estas AAIE, la **Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto**. Se vi interesiĝas pri la instruado aŭ lernado de Esperanto, membriĝu al AAIE. **Ron GLOSSOP** fidele gvidas tiun grupon. Vi rajtas membriĝi kun AAIE samtempe dum vi membriĝas kun Esperanto-USA kaj UEA en nia retbutiko [https://esperanto-usa.org/store/].

Vidu la raporton de nia estrarano Charlotte BURTON pri ŝia kuraĝiga prezentado pri Esperanto al ŝtata komitato de Teksaso.

Ekzistas multaj aliaj iloj por helpi vin antaŭeniĝi. *Ekparolu!* kaj aliaj edukaj materialoj haveblas en Interreto. Vidu la sugestojn en nia retejo kaj ankaŭ la retpaĝarojn de Lernu [https://lernu.net/], Tekstaro [http://tekstaro.com] kaj Edukado [http://edukado.net/].

## Helpu nin!

1. Partoprenu kaj aktiviĝu en via loka grupo.
2. Ĉiun semajnon, sekvu anoncojn en nia retpaĝaro, Twitter, kaj Reddit, kaj plusendu la informon al viaj neesperantistaj rondoj de amikoj.
3. Metu viajn komentojn kaj anoncojn en Facebook, Twitter, kaj aliaj sociaj medioj. Nepre referencu al nia retpaĝaro, kaj niaj paĝo en Facebook kaj Reddit.
4. Nepre uzu kradvortojn **#EsperantoUSA** kaj **#Esperanto** en viaj afiŝoj.
5. Partoprenu en niaj informdonaj kunvenoj (*"Webinars"*) kaj AMA-sesioj de Reddit ("*Ask Me Anything*" / Demandu al mi ion ajn.) Ni anoncos tiujn horarojn.
6. Lernu plu la lingvon Esperanto. Legu la belan literaturon. Ĝuu Esperanton.
7. Venu al nia 66-a Landa Kongreso en Seatlo [http://landakongreso.org]! Tio okazos tuj post NASK.
8. Re-membriĝu kaj ankaŭ donacu monon al Esperanto-USA.
9. Legu ĉiun numeron de *Usona Esperantisto*.




**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

**<filipo@grupoj.org>**

En ĉiu numero de *UE* mi petas la estraranojn iomete raporti lastatempajn farojn aŭ alimaniere komunikiĝi kun vi, la membraro.

Ni bezonas ankaŭ vian partoprenon, karaj membroj, do bonvolu sendi al la redakcio viajn demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro. Ni bonvenigas reagojn en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

*— La redaktoro*

## Charlotte Burton, Direktoro



Tre okupitaj monatoj! Pro la komenco de la lerneja jaro, mi povis ĝis nun verki nur tri ĉapitrojn de mia nova Esperanto-lernolibro. Tamen la bonkora Myrtis Smith helpegas en tiu laboro. Ŝi legas tion, kion mi skribis, kaj helpas min vidi ĝin de vidpunkto de lernanto, por plibonigi ĝin. Ŝi eĉ donas sian tempon por helpi legontojn, por ke ili povu aŭdi la ĝustan prononcon de pli da vortoj. Mi esperas verki plu dum la venontaj monatoj, se miaj devoj ĉe la lernejo (kie mi estas instruisto) kalmiĝos.

Plue, mi havas novaĵon el la mondo de Esperanto-instruado. Je la sesa de Oktobro mi vizitis Aŭstinon, la ĉefurbon de Teksaso, kun tri bonkoregaj homoj, kiuj kuniris por subteni min. Tie, mi parolis al la Teksasa Estraro de Edukista Rajtigado pri Esperanto. Mi havis iom malpli da tempo ol tiom, kiom mi esperis, sed mi parolis pri la graveco de instruado de fremdaj lingvoj, la malfacileco de naturaj lingvoj, kaj manieroj per kiuj Esperanto povus helpi niajn studantojn. Mi finis per peto, ke ili komencu proceDon por krei aŭ akcepti ekzamenon, kiu rajtigus iun instrui Esperanton en niaj publikaj lernejoj. Ĉiu estrarano foriris kun kopio de la tuta teksto de mia parolado, kaj ili rekunvenos en Decembro por diskuti ĝin plu.

Ni eĉ povus venki per du manieroj, ĉar, ĉe tiu kunveno, mi rimarkis frazon en la reguloj: laŭ ĝi, jam ekzistas reguloj, per kiuj lernejaro povus permesi al oni instrui maloftan lingvon por kiu ne jam ekzistas rajtiga ekzameno.

Do, mi nun havas planon por la venontaj monatoj: mi verku plu por la lernolibro, legu plu por malkovri la regulojn pri instruado de maloftaj lingvoj sen rajtiga ekzameno, parolu al mia lernejestro pri Esperanto kaj la ebleco instrui ĝin ĉe nia lernejo, kaj esperu pri la venontaj decidoj de la Teksasa Estraro de Edukista Rajtigado.

❧

## Paige Feldmann, Direktoro



Je la 23-a de Septembro, Prezidanto Filipo Dorcas okazigis "AMA"-eventon ("Demandu min pri io ajn") en la retejo Reddit. Diversaj homoj demandis pri kiel la estraro planas kreskigi la movadon, kiel trovi lokajn klubojn, kaj kiel la estraro plibonigos nian organizon. Filipo intencas okazigi alian AMA-eventon baldaŭ. Vizitu la Reddit-eron de Esperanto-USA [https://reddit.com/r/EsperantoUSA], kie troviĝas la tuta dialogo de la evento.

On September 23rd, President Phil Dorcas conducted an AMA ("Ask Me Anything") event on the website Reddit. Various people asked how the board plans to grow the Esperanto movement, how to find a local club, and how the board will improve E-USA. Phil plans to hold another AMA soon. Visit the Esperanto-USA subreddit [https://reddit.com/r/EsperantoUSA], where you can find a complete record of the event.

❧

## Nikvo Woods, Direktoro



Lastatempe mia esperanta laboro ĉefe temis pri la venontjara Landa Kongreso, kiu okazos inter la **13-a kaj la 16-a de Julio** en **Seatlo, Vaŝingtonio**. La Loka Kongresa Komitato multe okupiĝis lastatempe pri la kerna laboro por krei kiel eble plej amuzan, interesan, kaj fruktodonan kongreson. Ni diligente serĉas kaj kontrolas kongresejojn (danke al Ben Speakmon), prilaboras retpaĝon (danke al Jordon Kalilich), kaj

ekparolas al muzikistoj kaj aliaj konataj esperantistoj por spicigi la sperton. Chuck Mays de Raleigh kaj Janjo Pacejo de Bostono ankaŭ partoprenas, ĉeestante niajn ĉiusemajnajn kunvenojn kaj kontribuante siajn spertojn kaj ideojn.

Ni ĝojas anonci ke la Kanada Esperanto-Asocio akceptis nian inviton kunkongresi en Seatlo venontjare! Tio signifas ke la kongreso de KEA okazos samloke kaj samtempe kiel tiu de E-USA, do vere estos internacia okazaĵo.

Ni planas ankaŭ okazigi tendumadan okazaĵon post la kongreso, do estos tuta semajno de Esperantaj mojosaĵoj en Vaŝingtonio! Se vi volas esti parto de la teamo kiu okazigos tiun postkongresaĵojn, nepre kontaktu nin.

Ni strebas krei tre viglan kaj diversan programon por la kongreso. Se vi havas proponon por programero (aŭ ian ajn ideon pri la kongreso), ne hezitu kontakti nin ĉe **<seatlo2018@esperanto-usa.org>**. Ni esperas ke vi venos kaj festos Esperanton kun ni!

❧

Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- Ben Speakmon, Vicprezidanto
- Chris Nelson, Sekretario
- George Baker, Kasisto
- Jessica Grasso, Direktoro
- Lucy Harmon, Direktoro

## *enigmo-solvoj*

# La rostfesta murdo



En № 2017:4 aperis krimenigmo *La rostfesta murdo*. Ĉi-foje Profesoro Ŝibolet akceptis inviton al la domo de siaj amikoj Janjo kaj Georgo Gastem.

Ŝibolet alvenis trajne, do Janjo ŝoforis lin de la stacidomo. Alveninte hejmen, ili trovis la kadavron de kompatinda Georgo; iu murdis lin per tranĉilo. Sed kiu?

Janjo kriis kiam ŝi ekvidis Georgon, supozeble pro surprizo. Sed Petro Ŝtono, najbaro kiu subite alkuris ĉe la sono de la krio, trovis ŝian orelringon en la fajrejo, kie Georgo antaŭe rostis manĝaĵon...

Kiel kutime, Ŝibolet rapide solvis la enigmon – same kiel du el niaj legantoj!

Rafa Nogueras skribis:

> Mi pensas ke la murdisto estas Petro Ŝtono. Kial? Ĉar, kvankam li supozeble ĵus alvenis al la korto, li ial jam sciis, ke la fajrejo estas malvarma.

Sed kiel li sciis tion? Ellen Eddy klarigis:

> Petro Ŝtono sciis ke la karboj estas malvarmaj ĉar li mem metis la orelringon sub la karbojn post kiam li mortigis Georgon. Li ne timis enĵeti sian manon en la karbojn. Se mi vidus viandon super forbrulintaj karboj, mi ne supozus ke la karboj ankoraŭ ne estas varmegaj.

Aha! Denove Rafa:

> Normala homo, ĵus alveninta, estus supozinta, ke la karboj povus ankoraŭ esti varmaj, kaj verŝajne estus uzinta la forkon sur la plado, ekzemple, por eltiri la orelringon. Ŝajne li mem metis ĝin en la fajrejon post la murdo por kulpigi la edzinon.

Ĝuste.

Kaj same kiel en antaŭaj enigmoj, Ellen rimarkis ankaŭ aliajn strangaĵojn – ne decidigajn, sed almenaŭ suspektindajn:

> Ĉu oni povas aŭdi krion je 100 metroj distance tra arbaro? Kaj ĉu oni ja havas jaĥton en lageto?

Pro ilia lerta rezonado, Ellen kaj Rafa ricevas po unu premion: $5-rabaton de la retbutiko de E-USA. Gratulon al ili!

# La suneklipso de 2017

*Walter Murawski*

Multaj usonanoj ĝuis oportunon sperti la plenan suneklipson, kiu okazis la 21-an de Aŭgusto, 2017. Sed tiu eklipso estis plena (Suno estis tute kaŝita de Luno) nur por observantoj ene de maldika "strio de pleneco". Tiu strio trapasis la tutan kontinentan parton de Usono de Portlando en Oregono ĝis Ĉarlstono en Suda Karolino. Homoj ekster la strio spertis nur partan eklipson.



Plena stadio de la suneklipso. Fotis Tomas Murawski.

Miaj edzino, filo kaj mi spertis la fenomenon en la malgranda urbo Easley en Suda Karolino, ĉirkaŭ 250 kilometrojn de nia hejmo. Mia filo Tomas fotis la eklipson. En la komenco, kiam Luno komencis kovri Sunon, la ĉielo estis klara kaj preskaŭ sennuba. Iomete pli ol unu horo poste, Suno estis plene kovrita.

Ĉirkaŭ 20 minutojn post la ekkovro, venis nuboj kiuj tute kaŝis la spektatan fenomenon. Ni ekpensis, ke ĉio estas perdita: la penoj de la vojaĝo, la antaŭa preparado, ktp. Sed feliĉe, la nuboj foriris post 15 minutoj kaj la ĉielo estis denove klara. Ni senĝene vidis la plenan stadion de la eklipso.

Pleneco, la tempo kiam Suno estis tute kovrita, daŭris iomete pli ol du minutoj. Dum tiu tempo la ĉielo kaj la ĉirkaŭaĵo mallumiĝis. Ni sentis la temperaturon malaltiĝi. Estis sufiĉe mallume por vidi la planedon Venuso ĉe la okcidenta flanko de la kovrita Suno. Kolego diris al mi, ke li vidis ankaŭ Mekuron.

La eklipso estis vere vidinda fenomeno. Venonta eklipso estos videbla en Usono en la jaro 2024. Ni certe atendos ĝin.

# Fred MEYER, nia unua laŭdato

*Charlotte BURTON*

Jen nova rubriko de Charlotte BURTON, membro de nia estraro. En tiu ĉiu serio de artikoloj ŝi intervjuos aŭ alimaniere prezentos niajn membrojn por reliefigi ties aktivecon kaj sukcesojn en Esperantujo.
— *La redaktoro*



Fred MEYER

En Esperantujo, ni estas familio. Kiam unu sukcesas, la tuta Esperantujo pliboniĝas. Tial ni laŭdu la sukcesojn de individuaj esperantistoj, por ke ties sukcesoj inspiru niajn proprajn.

Fred MEYER estas bonega ekzemplo de esperantisto, kiu plibonigas nin ĉiujn. Li estas aktivulo, estro de la Elekta Komisiono por 2017-2018, kaj la unua el niaj novaj Regionaj Helpantoj.

Fred unue aŭdis pri Esperanto antaŭ 59 jaroj kaj li eklernis la lingvon antaŭ 52 jaroj. Dumviva lernanto, Fred ankoraŭ strebas akiri novajn lertojn. Ekzemple, ĉe la Landa Kongreso en Raleigh ĉi-jare, li sukcesis en la KER-ekzameno. Li estas nun inter la plej altnivelaj sukcesintoj, je nivelo C1 – vere ne facila atingo. Krom tio, Fred estas ankaŭ dumviva helpanto kaj aktivulo. Liaj oftaj artikoloj ĉi tie estas nur eta parto de lia agado.

Kiel estro de la Elekta Komisiono, Fred havas respondecon aŭskulti la membraron kaj serĉi aliajn aktivulojn, kiuj povus servi Esperantujon kiel estraranoj de Esperanto-USA. Pro la helpo de Fred kaj la antaŭa Elekta Komisiono, ni havis bonegan balotilon ĉe la ĉi-jara Landa Kongreso kaj trovis la nunan estraron, kiu laboras multe. Kaj denove, Fred serĉadas kaj helpadas trovi pli da bonegaj kandidatoj por la venonta elektado.

Krom tiel grava laboro, Fred helpas Esperantujon ankaŭ per sia volonteco kiel la unua el niaj novaj Regionaj Helpantoj. Ni esperas, ke baldaŭ ĉiu regiono en Usono havos propran reprezentanton por helpi al lokaj grupoj kaj faciligi komunikiĝon inter tiuj grupoj kaj Esperanto-USA. Kiel la unua helpanto, Fred jam helpas la estraron kompreni la defiojn de tiu rolo kaj la defiojn de niaj lokaj grupoj.

Regiona Helpanto komunikiĝas rekte kun grupoj en sia regiono, ĝisdatigas informon pri tiuj grupoj en nia retejo, kaj – plej grave – helpas al vi, la lokaj esperantistoj kaj grupoj, kiuj estas la koro kaj animo de la movado, trovi rimedojn por atingi viajn celojn. Fred servas la novan Sudan regionon — Arkansason, Kansason, Luizianon, Oklahomon, kaj Teksason – kaj helpas la estraron krei planojn por helpi ankaŭ estontajn Regionajn Helpantojn.

Pro la aktiveco de esperantistoj kiel Fred, la movado en Usono antaŭeniras nun per grandaj paŝoj. Se vi volas proponi iun al la Elekta Komisiono aŭ demandi pri lokaj grupoj en la Suda regiono, kontaktu lin. Fred MEYER subtenas multajn per sia aktiveco!

Kaj kio pri vi, kara leganto: ĉu ankaŭ vi volus esti helpanto por Esperanto-grupoj en via propra regiono? Se jes, nia prezidanto serĉas vin! Bonvolu kontakti lin ĉe <filipo@grupoj.org>.

## Malgraŭ uragano Harvey



De maldekstre: Filipo kaj Elizabeto DORCAS, Fred kaj Susan MEYER, Celia kaj Jarlo BILLS, Ron WOLF.

FORT WORTH, TEKSASO — Malgraŭ uragano Harvey kaj malsano de kelkaj kiuj volis veni, la Merga Semajnfino estis granda sukceso. Ĉiuj uzis Esperanton por aferoj kaj amuzaj kaj utilaj.

Sep homoj partoprenis. Kvankam tiuj sufiĉis, nature ni sentis la mankon de tiuj kiuj ne povis partopreni. La ĉeestantoj venis de Sherman, Dalaso, kaj Fort Worth, Teksaso. La evento daŭris de la kvara je vendredo, la 1-a de Septembro, ĝis la tria je dimanĉo, la 3-a. Ni dankas al Filipo kaj Elizabeto DORCAS pro ilia gastigado.

Jarlo BILLS faris la horaron. Kiel Jarlo diris, la grava afero ne estas horaro, sed fakte planado. Estis du seriozaj diskutoj dum la semajnfino. La unua estis diskuto pri sanservoj, kiu havis du partojn: "Kiaj estis notindaj lastatempaj spertoj de vi, viaj familianoj, aŭ viaj amikoj kun sanservoj?" kaj "Kiel vi volas ŝanĝi la usonan sanservan sistemon?"

La diskuto okazis kiel Samoa Cirklo: aŭskultantoj sidis en cirklo ĉirkaŭ kvar seĝoj por parolantoj. Por diri ion, oni iras al al centro kaj tie diskutas la aferon kun aliulo kiu ankaŭ sidas en la centro. La diskuto estas duflanka, kaj oni ne sidas en la centro tro longe. Oni lasas tiujn en la aŭskulta cirklo veni al la centro por diskuti. En nia kazo, ni metis nur du seĝojn en la centro. La diskuto iris bone. Ĉiuj esprimis sin plene kaj trankvile, kaj ni lernis multon.

La dua serioza afero estis biblia studado dimanĉe. Ni legis *Psalmo 37*. Estis kaj judoj kaj kristanoj inter ni. Mi sentis la mankon de islamanoj kaj bahaanoj; pasintfoje ni havis anojn de tiuj religioj en nia nord-teksasa grupo. Dum la studado, ni diskutis la psalmon de multaj vidpunktoj. Ĉiu esprimis sian komprenon kaj vidpunkton. Ni lernis multon.

Sed ne ĉio estis serioza. Ni uzis infanan ludon por lerni novajn Esperantajn vortojn. Dum la ludo, oni portis zonon ĉirkaŭ la kapo kun karto en ĝi. Oni ne povis vidi sian propran karton, sed ĉiuj aliuloj povis vidi ĝin. Oni provis diveni per "ĉu"-demandoj, kio estas sur la karto. Elizabeto DORCAS kunmetis helpan kelkpaĝan liston de tiaj demandoj. Unufoje mi estis frago. Ni ludis tiel kelkfoje. Ni multe ĝuis la ludon.

Ni ludis ankaŭ duan ludon: ni devis konstrui Esperantajn frazojn. Oni lernis pri la utilo de verboj kaj substantivoj en tiu ludo. La ludo estis kreaĵo de Lynne WOLF.

Estante homoj, la unua afero, kiun ni faris je vendredo, estis manĝi. Ĉiu alportis manĝaĵon por la unua nokto. Estis kvinoa salato, piza supo, pano, frukto, kaj vino. Nature mi kunportis recepton por la kvinoa salato. Ron WOLF alportis panon el lina kaj migdala faruno. Matene ni manĝis ovojn, panon, kaj frukton. Ni tagmanĝis sandviĉojn farĉitajn per ruĝkapsik-fromaĝa salato aŭ de kok-salato fare de Susan MEYER. Posttagmeze, por vespermanĝo la grupo kune preparis grandan supon per karot-zingibra buljono. La supo enhavis terpomojn, spinacon, celerion, karotojn, kaj aliajn legomojn. Ni ĉiuj helpis purigi la kuirejon kaj la manĝejon post la manĝoj.

Post la sabata vespermanĝo, ni parolis pri la mortoj de Paul GUBBINS kaj Marjorie BOULTON, gravaj perdoj la Esperanta movado. Ni legis el la libro *Faktoj kaj Fantazioj* fare de Marjorie BOULTON por memori ŝin. Ron WOLF fotis la grupon. Li uzis alt-kvalitan fotilon kiun li regis per tekkomputilo.

Sabate, ni ĉiuj kantis kelkajn kantojn kune. Ni uzis

aron de kantoj kiujn ni kolektis tra la jaroj. Antaŭ kelkaj jaroj Ron kompilis unu dokumenton el ili. Jarlo BILLS akompanis nin gitare. Nature la lasta kanto estis la *Esperanta Himno*.

— *Fred MEYER, III*

## Tri-kantona Paralela Universo




De maldekstre: Bobby BROOKS, Kat DRENNON, Silvio KURTISO, Izako MOORE, Edgaro RENTANA. Fotis Kenecĉjo GOLDBERGO.

SANTA MONICA, KALIFORNIO — Tri-kantona Paralela Universo ĉe uno loko!

La 19-an de Aŭgusto, post multe da planado, la Suda Kalifornia Esperantista Renkontiĝo (SuKERo) kunvenigis ses festantojn el tri apudaj kantonegoj en la plaĝurbo Santa Monica. Oni ĝuis esti kune en malkovrita, belega parko; poste ni iris al la fama plaĝo.

— *Kenecĉjo GOLDBERGO*

# Fiamo




Ellen EDDY afable sendis la jenan foton. Ŝi skribis:

> Mi rimarkis la nomon de tiu picejo en la urbcentro de Viktorio. Ĉu la nomo rilatas al maldeca amo al picoj? Aŭ ĉu amo al maldecaj picoj? Mi ne scias, sed ĝi ja estas pensiga.